



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 5-an de Junio 2023

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval. **Zome:** Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Gabi Zeevi. **Gasto:** Ŝulamit Tendler.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Amri** partoprenis la 3-tagan Germanan Kongreson, kun ĉ. 200 partoprenantoj kaj densa programo. La kondiĉoj estis modestaj: junulargastejo, 4-personaj ĉambroj, du-etaĝaj litoj; la prezo pli alta ol ĉe nia IK, sed inkluzivis la manĝojn – ne la ekskursojn.

b) **Raporto de la Kontrol-Komisiono:**

(1) La subskriboj sur la ricevitaj fakturoj pro elspezoj estu pli klaraj; estu kreita tabelo kun specimenoj de subskriboj laŭ la specoj de elspezoj.

(2) ELI ne sufiĉe plenumas la celojn difinitaj en la statuto pri disvastigo de E-o; ĝi devas propagandi E-on uzante profesiulojn.

Jehoŝua: ELI fondiĝis en 1949, kaj ĝia statuto (hebrealingva) ne estis ĝisdatigita ekde tiam. Ni singarde ne aktualigis ĝin, por eviti eventualajn burokratajn obstaklojn. Cetere ni ne kapablas financi eĉ unu radio-reklamon, certe ne dungi reklamistojn. La kritiko ne estas reala. Siatempe ni havis plurajn kursojn: koresponda (Anat Zajdman), ĉeestaj (d-ro Maschler, Giladi, Murĵan, Savir, Ŝemer, mi mem, Salzman, Modan), estas reta (Amir Naor), estas retaj memlernaj (Lernu, Duolingo, ktp) – sed la plimulto de la lernantoj ne daŭrigas, malaperas.

Amri: la mondo ŝanĝiĝis, la kanaloj ŝanĝiĝis. Hodiaŭ ni agas aliel, pli malmultekoste – kion la komisiono ne konscias! Kaj krome: nun ni eĉ ne havas instruiston. **Inbar:** ni devus aperi en la Instagramo, kaj aliaj pli modernaj sociaj retoj. **Ŝlomo:** ni ne devas paroli kun la Kontrol-Komisiono, sed antaŭ la publiko de la Ĝenerala Kunveno; ni devas informi, kion ni faris. **Amri:** ili devus reformuli sian raporton. **Decido:** *la estraro reagos al la raporto de la K-K dum la Landa Kunveno.*

2. La opini-diferencoj inter Amri kaj Mikaelo

Amri protestas kontraŭ la originala tagordero “konflikto”, ĉar ĉiam havis amikajn kunlaborajn rilatojn kun Mikaelo; do maksimume oni povas nomi la nunan situacion “miskompreno”. Ŝajnas ke la ĉefa kaŭzo de la ofendiĝo de Mikaelo estas la manko de reago, kiun li supozeble atendis de mi; sed mi ne povis reagi, ĉar dum almenaŭ du semajnoj Dror kaj Jehoŝua, kiuj ricevis la plendon de Mikaelo, nenion sciigis al mi. Mi nur hazarde eksciis pri la plendoj de Mikaelo demandinte Gabi kaj Jehoŝua pri IE kaj reagis eĉ antaŭ ol ricevi la deklaron de Mikaelo, ne sciante precize pri kio temas (aldonita dokumento al la tagordo); kelkajn tagojn poste, antaŭ la kunsido, mi reagis konkrete pri la kritikoj de Mikaelo, kopie al la tuta estraro inkluzive de Mikaelo mem. **Mikaelo:** Mi reskribos miajn reagojn pli koncize, kaj sendos al Jehoŝua por plusendi al la Estraranoj. **Gabi:** vi povas sendi al ili rekte, kiel respondon al la protokola malneto.

2/...



Jehoŝua: ni atendu la koncizan version kaj nun iru al la venonta tagordo. **Amri** insistas trakti la aferon laŭ la tagordo, ĉar ĝi jam estis suface prokrastita. La letero de Mikaelo estis reverkita, polurita kaj legita de pluraj estraranoj, kaj por mi suface klaras. La 23-a Israela Kongreso en Tiberiado okazis, laŭ preskaŭ ĉiuj reagoj de partoprenantoj ege sukcese (en la resuma forumo ĉ. 20 reagintoj preskaŭ senescepte laŭdis la etoson, programon, kongresejon, ekskursojn. Same esprimas tion la longa kaj ege detala artikolo de Gražina el Litovio, kiu aperis en la junia n-ro de *Esperanto*. Mi devis ĉion sole organizi (kongresejo, eksterlandanoj, financoj, programo, ekskursoj) kaj investis en tiu kongreso ne kredeble multan tempon dum la tuta jaro. Se eĉ unu partoprenanto ne estis kontenta kaj tiom akre kritikis, kiel faris Mikaelo, sen ajna reago de la estraro, tio estas por mi la lasta pajlo. Sekve, kiel mi diris al Jehoŝua telefone antaŭ kelkaj tagoj, **mi decidis demisii de ĉiuj taskoj de la organizado de la venontaj israelaj kongresoj**, krom de la ekskursoj. Freŝaj fortoj estas bezonataj kaj serĉataj. **Mikaelo:** la arta programo estis aranĝita sen konsulti min. Do, aperis homo, kiu en la pasinteco ĉiam malhelpis mian laboron. **Amri:** la programo estis publikigita en la retejo de ELI kaj sendita al ĉiuj membroj unu monaton antaŭe, ĉiu povis legi. Krome la programo estis disdonita en papera formo al ĉiu alveninto komence de la Kongreso. Mi aldonis tiun personon al la ukraina programo bonintence, simple ĉar li venis el Ukrainio. Mi ja ne povis scii pri viaj iamaj konfliktoj, Se tio ne plaĉis al vi, estis suface da tempo por tion diri al mi longe antaŭ la kongreso kaj mi tuj modifus. **Mikaelo:** la kongresejo ne taŭgis por la prezentantoj: estis bruo, trairado de gastoj. **Amri:** tio estis la plej bona solvo konsiderante ĉiujn cirkonstancojn: anstataŭ iri dek minutojn al alia loko antaŭ kaj reen post ĉiu programo. Cetere, neniu alia partoprenanto plendis pri tio – la aliaj loĝantoj en la hotelo estis tre malmultaj, ĉar preskaŭ ĉiuj ĉambroj estis okupitaj de ni. **Mikaelo:** mi vidas la aferon el artista vidpunkto.

3. Israela Esperantisto

Amri: mi reprenas mian ne-bone elektitan vorton pri la malneto de la lasta IE. Ĝi havis 10 punktojn por korekti, plibonigi – sed estis jam tro malfrue ĉar Mikaelo sendis ĝin al la presejo sen montri al mi antaŭe, malgraŭ pluraj miaj petoj du tagojn antaŭ la kongreso. **Amri** proponis jam antaŭ la kongreso anstataŭe produkti duoblan n-ron, ĉar la lasta n-ro de IE aperis antaŭ ĉ. unu jaro. Estas sufiĉe da enhavo por duobla bulteno. Estas multe da materialo pri nia kongreso, la sama kiu aperis en *Esperanto*. Mi povas sendi ĝin dum la venontaj tagoj. Fotoj sur la kovrilo: almenaŭ unu estu la kovrilo de la junia *Esperanto* dediĉita al nia kongreso. **Jehoŝua** devos skribi la nekrologojn kun aldonitaj fotoj. **Eran:** **Miĥal** jam skribis unu, sed ŝi postulas ne mallongigi, ne tuŝi ĝin. **Mikaelo:** mi enpaĝigos ĉion kion mi ricevos, sen ŝanĝi ion ajn. Sed – mi nun troviĝas en Pollando kaj revenos nur fine de Julio. **Amri:** tio ne malhelpas, eblas ĉion prepari kaj enpaĝigi, ev-e eĉ presi ĝis la reveno de Mikaelo. Li devos fizike ĉeesti nur por la ekspedado. Ĉu Jehoŝua povas prizorgi la nekrologojn dum unu monato? **Jehoŝua:** tio ne dependas de mi, ĉer mi atendas al materialo de parencoj de kelkaj el la forpasintoj. **Amri:** se ili ne reagos ĝustatempe, ĉu vi povas mem kumeti la nekrologojn el via kono de la forpasintaj

3/...



Membroj? **Jehoŝua**: jes. **Gabi**: mi povas traduki unu paĝon aŭ pli da ŝerĉoj, la redaktoro elektu el ĝi.

4. Landa Kunveno

Jehoŝua: ni estos fizike en la kunvenejo de nia oficejo (Alon-Turo-2), eblos ankaŭ zoma partopreno. **Ŝlomo** devos prezenti diversajn oficialaĵojn por voĉdonado. Ĝis nun nur **Inbar** volontiĝis por la arta parto, kaj **Amri** pretas paroli pri la Germana Kongreso. **Jehoŝua**: la nombro de la partoprenantoj gravas ĉe la Registristo pri Societoj!

5. Magazeno por la libroj de ELI (Ŝlomo, Jehoŝua)

Ŝlomo daŭrigos siajn klopodojn lui aŭ akiri lokon.

6. Plenumo kontraŭ la buĝeto – la unua kvarono

Ŝlomo prezentas sian raporton – neniu aparte komentis.

La venonta kunsido: lunde, la 3-an de Julio 2023, je la 20:00

Protokolis: Gabi Zeevi